Kastelo de Kronborg

La **Kastelo de Kronborg** situas proksime de Helsingør, Danio. Ĝi estas unu el la tri danaj monumentoj deklaritaj Monda heredaĵo de Unesko kune kun la Katedralo de Roskilde kaj la runoj kaj tomboj de la preĝejo de Jelling.

Dum pluraj jarcentoj Danio havis gravajn enspezojn per imposto al la ŝipoj kiuj transiris la markolon de Sundo, markolo kiu disigas la danan insulon Sjælland de Svedio. La kastelo de Kronborg ludis gravan rolon en tiu tasko.

Nuntempe ĝi estas sidejo de la Mara kaj Komerca Muzeo de Kronborg. Kelkaj el ĝiaj dependaĵoj estas viziteblaj de la publiko. Ĝi estas la loko kie okazas *Hamleto*, la verko de Ŝekspiro. En tiu verko, la kastelo de Kronborg nomiĝas "Elsinore".

Kastelo de Kronborg

Monda heredaĵo

Flanka vido de la Kastelo

Lando	Danio
Tipo	kultura heredaĵo
Kriterioj	iv
Fonto	696 (http://whc.unesco.org/en/list/696)
Regiono**	Eŭropo kaj Nordameriko
Geografia situo	56° 2′ 19″ N, 12° 37′ 19″ O (https://tools.wmflabs.org/geohack/geohack.php?pagename=Kastelo_de_Kronborg&language=eo&params=56.038611111111_N_12.621944444444_E_region:DK-85_type:landmark&title=Kastelo+de+Kronborg) (mapo)

Registra historio

Registrado	2000 (24-a sesio)

Geografia lokigo sur la mapo : Danio



* Traduko de la nomo en la listo de la monda heredaĵo. (http://whc.unesco.org/en/list)
** Regiono laŭ Unesko. (http://whc.unesco.org/en/list/?search=&search_by_country=&type=&media=&region=&order=region)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kastelo_de_Kronborg&oldid=5729007"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:11, 18 aŭg. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.